Cezar,

# Tombeja kvieto

*(por B. Traven)*

Ĉar nur mortintoj sin ne batas
mi la tombejojn vere ŝatas.
Eternan pacon ni nur trovas,
se ni en tomb' nin sterni povas.

Mortintoj estas tre pacemaj
al malamikoj grimacemaj,
nur al kvieto sin fordonis,
vivante tiom ne imponis.

Mortint' neniam ekfantomas
aŭ post la morto plu endomas.
Mortinto ĉiam nur silentas,
sed dentgrincige elokventas.

*Verkinto de tiu ĉi Esperanta poemo estas* Cezar *(civila nomo: Hans-Georg Kaiser, ∗1954-05-21), publikigita 2007-04.*

*Arg-403-797 (2007-04-10 22:57:10)*